IV

Silento falas! De nun ĉiu
Aŭskultas plenkredulo
Pri l' *Sonĝinfano* kiu vivas
Kun bird' kaj best' kunulo,
Kunul', jen kiel arbo alta,
Jen eta kiel kulo.

V

Tre ofte volus la laculo
La Sonĝon maldaŭrigi,
Promesas je sekvanta fojo
Ĝin iom plilongigi.
"Jam venis la sekvanta fojo,
Nin volu kontentigi!"

VI

Do kreskis plu la Mirlandaĵoj
Iom post iom, grade:
Naskiĝis ĉiuj en boato
Dum vagis ni remade.
—Subiras sun', do hejmen gaje
Ni remas babilade.

VII

Jen *Alici'*. Akceptu ŝin
Kaj ĝardu en memoro:
Al pilgrimint' ja kara estas
El malproksim' la floro;
Velkinte ĝi memorojn vekas
Valorajn pli ol oro.

# LA AVENTUROJ DE ALICIO EN MIRLANDO

## ĈAPITRO I

### MIRINDA FALEGO!

ALICIO, jam longan tempon sidinte apud sia fratino sur la deklivo, tre enuiĝis pro senokupo. Unu, du foje ŝi prove rigardis en la libron kiun la fratino legas, sed povis vidi en ĝi nek desegnojn nek konversaciojn, kaj "por kio utilas libro," pensis ŝi, "enhavanta nek desegnojn nek konversaciojn?" Ŝi do ekpripensis—ne tre vigle ĉar la tago estis varma, kaj ŝi sentis sin tre dormema—ĉu la plezuro fari ĉenon el lekantetoj valorus la laboron sin levi kaj kolekti lekantetojn, kiam tutapude preterkuris Blanka kuniklo kun paleruĝaj okuloj.

Tio ja ne estis *tre* mirinda, ankaŭ ne ŝajnis al Alicio *tre* eksterordinare aŭdi la kuniklon diranta al si:—

"Ho, ve! mi malfruos!"

(Kiam poste ŝi pripensadis la aferon, ŝajnis al